

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PÉRREUX/Marne
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazø B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 4 F. Abono: 15 F (TTC). Kotizo: 5 F. Sumo: 20 F. ====

+++++
N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la
5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++
==== N° 137 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1983 ====

+++++
BILETO DE LA PREZIDANTO
=====

LOURDES 1983. Le sanctuaire privilégié de Notre-Dame, lieu de foi et d' es-
pérance, a reçu de nouveau notre étendard. Ce lieu qui attire chaque année des
foules priantes venues du monde entier, est bien celui où s' exprime le mieux le
besoin d' unanimité des chrétiens; mais comme cette unanimité serait plus éviden-
te si une même langue comprise de tous servait aux prières communes et aux chants
de tous ces pèlerins assemblés.

Ce pèlerinage de notre association fut aussi l' occasion de partages spi-
rituels sous la direction du P. Bourdon notre conseiller spirituel; au cours de
ces entretiens, chacun de nous a mesuré la nécessité d' approfondir les données
de l' Ecriture Sainte et de l' enseignement de l' Eglise, selon les directives du
Concile Vatican II en comprenant mieux notre rôle et notre responsabilité person-
nelle de laïcs actifs et non passifs dans la construction du Royaume de Dieu.

Cette responsabilité nous fait un devoir de nous manifester comme chré-
tiens dans le milieu espérantiste, d' y être les témoins de la dimension spiritu-
elle de l' homme, de la présence du divin dans notre vie terrestre.

C' est ainsi que nous perpétuerons la démarche du fondateur d' Espero Ka-
tolika, l' abbé Emile Peltier, décédé à Lourdes en 1909, et dont la tombe, située
dans le vieux cimetière, sera bientôt restaurée par les soins des espérantistes
catholiques.

Emile Peltier est cet admirable pionnier, porté par son idéal malgré une
santé chancelante, qui a consacré sa vie à l' idée d' une unanimité plus grande
des chrétiens par la compréhension mutuelle au delà des frontières, par la commu-
nication à l' aide de la langue universelle, et, dépassant les séparations histo-
riques, par le rapprochement des frères dispersés par les querelles du passé, et
cependant tous attachés au règne universel du Christ.

Notre association invoque aussi le patronage du prêtre martyr Maximilien
Kolbe, que l' Eglise vient d' honorer du titre de saint; il fut aussi un fervent
pèlerin de Lourdes, et un missionnaire de l' espérance en Marie Immaculée. On
connaît les circonstances de sa mort tragique, dans le bunker de la faim, où il

..//...

per artikoletoj pri nia regiono, se ili montras internacian intereson. Pri la Eku-
mena Kongreso en Hamburg aperis nur 13 linioj en n^o 1/82 de EK; ne sufiĉe.
Balotoj: oni ne prezentas la kandidatojn, pro tio multaj ne voĉdonas.
Rilatoj kun IKUE: mankas demokrateco. Pli bone kun KELI.
Diversaĵoj: en Romans ne okazis diservo.
Pro la eksterordinaraj elspesoj en Lourdes, ne estos profito.
S-ro Collet plu tenos nian flagon en sia hejmo.

* * *

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO

Ĝi okazis tuj post la ĝenerala kunveno.
Ĉeestas: P. Bourdon, S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Preux, S-roj Colas kaj Vil-
leneuve.

La estraro restas senŝanĝa.

Venonta kunsido: ~~23~~¹⁸-an de septembro je la 14.00 en Paris.

Protokolis: G. Preux.

xx

LINGVA ANGULO

Post la apero de FKE n^o 136 venis X 1 plia kontribuaĵo de S-ro BURSZTA el
Pollando (Bu), kaj 1 de D-ro DUMAS (Du). Ili ne povos partopreni en la 1-a parto
de la konkurso, sed iliaj tradukoj, estas bonvenaj:

- 1) parolu pri io alia (Bu); ne tiom aktoru (Du).
- 2) baldaŭ li multe gajnos de tio (Bu); li semis kaj rikoltos (Du).
- 4) tio ne estas mia branĉo (Bu); mi ne kompetentas (Du).
- 5) ne kanonizindaj uloj (Du).
- 6) ne gajniga afero (Du).
- 7) ne gravas (Bu, Du); estu senzorga (Du).
- 8) feliĉan inŝpiiron (Du).
- 9) ĉu vi forĝesis lingvon, ĉu vi forĝesis paroli (Bu); ĉu mutigita (Du).
- 10) estas neniu ĉi tie (Bu); svarmas malmulto (Du).

* * *

Jen nun la tradukoj proponitaj de G-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (Da), DEGOUL
(De), DUMAS (Du), MICHAU (M), STANIENDA (S) por la esprimoj aperintaj en n^o 136:

- 1) pour le tenir en échec, il faudrait se lever tôt: por lin superi necesus grava
sperto (B); oni devas rapide kontraŭstari por venki lin (Da); por lin venki, necesus
frue levigigi (De); por lin venki, necesus ruzi (Du); por lin venki, sagaceco
utilus (M); oni devas ellitiĝi frue por bari al li aliron, nur fruleviginto povas
devanci lin (S).
- 2) juger sur pièces: juĝi per dokumentoj, per pruviloj (B); decidi laŭ dokument-
aĵoj (Da); taksu laŭ videblaĵoj (De); juĝi laŭ dosiero, senpere sperti (Du); laŭ-
rezulte juĝi (M); juĝi el pecetoj, prijuĝi tutaĵon el pecetoj (S).
- 3) jouer sur du velours: ludi senriske, ludi sur tute glata tereno (B); agi kun
certeco pri sukceso, agi sen risiko (Da); senriske agi (De); plej facile gajni (Du);
vetludi perludan gajnitaĵon (M); nenion riski (S).
- 4) faire des étincelles: brile sukcesi, montriĝi belbrila (B); flagre sukcesi (Da)
esti brilega (De); brilege sukcesi (Du); fajrere eksplodi (M); elsalti el sia haŭ-
to, peni intense, klopodi energie (S).
- 5) obtenir gain de cause: trafi pravigon (B); sukcesi post debato, gajni post dis-
kuto (Da); proceske sukcesi (De); havigi al si kompenson (Du); efike pledi, sukce-
se procesi (M); gajni aferon, venki kontraŭulon (S).
- 6) un fou du volant: rapidfrenezulo, troniskema aŭtisto (B); pasiulo pri aŭto-
kondukado (Da); stirfreneza aŭtisto (De); senprudenta stiranto (Du); pasia ŝoforo
(M); freneza kuremulo (S).
- 7) faire front commun: kune fronti (B, De, Du); kunbatali (B); kuniĝi kontraŭ
danĝero (Da); kunigi siajn peonojn (Du); samcele kunfronti (M); komune kontraŭstari,
solidariĝi (S).
- 8) arriver sans crier gare: senaverte alveni (B, Da, M, S); alveni ne atentigante
(De); neatendite alveni (Du); surprize ekaperi (M); surprizi (S).
- 9) faire la une des journaux: ĉeftitoli, iĝi la sensacia ĉeftitolo (B); plej grava
evento (Da); ricevi la unuan paĝon de la gazetaro (De); esti grandlitere anoncita
(Du); unuapaĝe ĵurnalaperi (M).
- 10) se disputer les gros titres: vete ĉeftitoli (B); esti la ĉefaj temoj el la ga-
zetaro (Da); konkure peti la titolojn (De); esti konkurence raportita en gazetoj

HOMA MIZERO

Kiu diros la suferon de la malsanulo, kiu atendas viziton neniam venantan?

Kiu rakontos la doloron de la maljunulo, kiun neniu vizitas?

Kiu kantas la malĝojon de la izolulo, perdita en la popolamaso de urbego?

Kiu komprenos la ĉagrenon de la infano sen patrino, sopiranta al vera familia hejmo?

Kiu donos la esperon al la senespera homo, deziranta nur morton?

Ho Sinjoro, kompatu kaj kunligu ĉiujn homojn en via amo!

AB

xx

ESPERANTO EN RADIO

- 0.30-1.00: PEKINO: kHz 11515 9860 - m 26,05; 30,43 (1)
- 0.45-1.00: ZAGREB: kHz 1143 - m 262 (11)
- 7.00-7.20: VATIKANO: kHz 15120 11740 11715 9625 6250 1611
m 19,84; 25,55; 25,61; 31,17; 48,00 186 (3)
- 7.30-8.00: POLONIA: kHz 7270 6135 5995 3955 1503
m 41,27; 48,90; 50,04; 75,85; 200 (1)
- 7.45-7.57: VIENO: kHz 17745 6155 5945 - m 16,90; 48,74; 50,46 (2)
- 7.40-8.00: Ekvadoro-R. HCJB: kHz 11835 - m 25,35 (14)
- 9.30-10.00: Franc. R. 3: MHz 98,4 (9)
- 11.45-11.57: VIENO: kHz: 9770 7170 6155 - m 30,71; 41,84; 48,74 (2)
- 13.00-13.25: POLONIA: kHz 9525 7145 - m 31,50; 41,99 (1)
- 13.00-13.30: PEKINO: kHz 9860 7315 - m 30,43; 41,01 (1)
- 14.00-15.00: Franc. R. ESPERANTO: MHz 89,45 (4)
- 15.00-15.30: PEKINO: kHz 15165 11685 - m 19,78; 25,67 (1)
- 18.25-18.30: Hung. PECS: kHz 873 - m 343 (13)
- 18.30-18.55: POLONIA: kHz 7285 6095 - m 41,18; 49,22 (1)
- 19.00-20.00: Franc. R. ESPERANTO: MHz 89,45 (6)
- 19.20-19.25: " EXPRESSION NORD: MHz 94,7 (7)
- 19.30-20.00: " R. 3: MHz 98,4 (10)
- 20.00-20.15: SVISA R. INTERNACIA: kHz 9535 6165 3985 - m 31,46; 48,66; 75,28 (5)
- 21.00-21.10: VATIKANO: kHz 15120 11700 9645 9625 7250 6250 6190 1530
m 19,84; 25,64; 31,10; 31,17; 41,38; 48,00; 48,47; 196 (12)
- 21.30-22.00: POLONIA: kHz 7285 6095 - m 41,18; 49,22 (1)
- 22.00-22.20: ROMO: kHz 11800 9710 7275 - m 25,42; 30,90; 41,24 (8)
- 22.00-22.30: PEKINO: kHz 9965 9365 7470 - m 30,11; 32,03; 40,16 (1)
- 22.30-22.45: SVISA R. INTERNACIA: kHz 9535 6165 3985 - m 31,46; 48,66; 75,28 (5)
- 23.10-23.30: Ekvadoro-R. HCJB: kHz 17790 - m 16,86 (14)
- 23.30-23.55: POLONIA: kHz 7285 6095 5995 3955 1503
m 41,18; 49,22; 50,04; 75,85; 199,6 (1)

- (1) ĉiutage - (2) dimanĉe - (3) ĵaŭde - (4) merkrede, nur pariza regiono - (5) lunde, ĵaŭde, sabate - (6) vendrede, nur pariza regiono - (7) la 3-am lundon, nur Lille-regiono - (8) sabate - (9) lunde, pariza regiono - (10) marde, pariza regiono - (11) marde - (12) dimanĉe, kaj la 13 kaj 15/8, 1/11, 8, 24 kaj 26/12/83 - (13) nur dum junio, julio kaj aŭgusto - (14) la unuan mardon de la monato

La ondolongoj substrekitaj estas aŭskulteblaj en Franclando. La horoj estas la somera horo por Franclando.

NE SUFICAS NUR AUSKULTI! la esperantaj radioelsendoj estas la plej regula kontakto kum la parola lingvo por la plimulto de la esperantistoj. Pasintjare okazis 3.623 tiaj elsendoj, kiuj daŭris 1 555 horojn. Tio signifas, ke ĉiutage oni povas aŭskulti Esperanton per radio dum pli ol 4 horoj. Provu, kaj konsci, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco. Pro tio SKRIBU AL LA RADIOSTACIOJ!

Widu la adresojn sur la sekvanta paĝo.

RADIO ROMA - ESPERANTO

POR LA REVENO DE LATINO

teksto de Lo Voi, traduko de De Salvo

Alvoko al la itala Parlamento, favore al la instruado de latina lingvo en la italaj mezgradaj lernejoj, estis subskribita de 130 italaj intelektuloj, universitataj profesoroj, verkistoj kaj studuloj, tuj antaŭ la diskuto, ĉe la Senato, de la projekto de reformo de la italaj mezgradaj lernejoj.

La subskribintoj esprimis sian firman konvinkon, ke la studo de la latina kulturo devas konsistigi nepran parton de la instruaj celoj, pro sia neamstataŭigebla kontribuo al la lingva, historia kaj eŭropa formiĝo de la junularo. Inter la subskribintoj elstaras Alberto Moravia, Carlo Bo kaj Italo Calvino.

KOTIZTABELO 1983

IKUE kun "Espero Katolika" 60 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 20 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 10 F
Bonfarantoj 100 F
Dumvivaj membroj 400 F

UFE kun "Revue Française" 145 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 175 F

Abono al "Biblia Revuo" 40 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. 2 324 93 N.

ENHAVO

- | | |
|--|---------------------------|
| 1. 2. Bileto de la prezidanto | 6. Esperanto en radio |
| 2. Protokoloj de la komitat- kaj ĝenerala kunvenoj | 7. Nekrologo |
| 3. Lingva angulo | 7. Papaj preĝintencoj |
| 4. La tombo de P. Peltier | 7. Emancipado |
| 4. La Evangelio laŭ S-ta Johano | 7. Enketo |
| 5. Pri nia pilgrimo en Lourdes | 8. Radio Roma - Esperanto |
| 6. Nia membraro | 8. Kotiztabelo 1983 |
| 6. Homa mizero | |

Dépôt légal: 2ème trimestre 1983 !! Polycopié par l' A. C. F. E.
 C. P. P. A. P. n° 62 532 !! Prieuré St-Martin
 Directeur: René-Claude COLAS !! La Houssaye-en-Brie
 Directeur-délégué: René-Jean MARMOU !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE

lastmomente ! ...

VENONTA KOMITATKUNVENO : dimanĉo la 18-an de septembro 1983, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS. La sidejo estos malfermita ekde la 11-a horo. Eblos tagmanĝi kune en memserva restoracio. La kunveno komenciĝos je la 14-a horo. Observantoj daŭre bonvenaj.